

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

---

## IPR

Organo de Internacia Ligo  
de Esperantistaj Instruistoj

## ILEI

---

9-a jarkolekto

N-ro 1, 1979

Edistudio, Pizo, Italujo

ENHAVO

- a. ĝeneralaj artikoloj.  
Claude Piron — *Esperanto, formo de humanismo* .....1
- b. fakmetodaj kaj didaktikaj traktaĵoj.  
Helmut Sonnabend — *Fremdlingva orientado pere  
de Esperanto* .....9  
Judit Kalotai — *Ekde 1981: Esperanto en gimnazioj* .....12  
d-ro István Szerdahelyi — *Enkonduko al la programo* .....14
- c. la korekta lingvo.  
André Cherpillod — *De aŭ da* .....18
- ĉ. rekomenditaj libroj.  
Bruĉjo Kasini — *Szerdahelyi, Migliorini, Varankin, Sadler* ...20
- d. estraraj informoj de Ilei.  
\* — *13a Internacia Konferenco en Lokarno, Svisujo* .....23  
Bruĉjo Kasini — *Internaciaj Someraj Esperanto-Kursoj* .....25  
Josef Chvosta — *Tendaro en Pollando* .....27  
Giorgio Silfer — *Mortis Gaston Turin* .....28
- suplemento  
B. Frank Böhringer — *Komuna resumaro de sciencaj revuoj I-IV*

# Esperanto, formo de humanismo.

Claude Piron

Nenio, ŝajnas al mi, povas pli bone difini humanismon ol la verso de la latina poeto Terencio: "Homo mi estas, nenion homan mi taksas al mi fremda". Baze de tiu konceptado troviĝas sento de solidareco, kiu unuigas la humaniston kun la homo, kun ĉiuj homoj, al kia ajn raso, religio, kulturo ili apartenas.

Esti humanisto, tio estas, tute simple, ami la homon, kaj ami en la profunda signifo de la vorto, tio estas deziri, ke la alia disfloru laŭ la propra naturo, emi rilati kun li kaj lin koni, kaj respekti lin en lia integreco.

Ĉiuj ĉi elementoj retroviĝas ĉeradike de la Esperanto-fenomeno. Povas aperi strange, ke oni dediĉu iun nombron da horoj por asimili lingvon preskaŭ tute senutilan komerce kaj industrie, lingvon, kiun la monda diplomatio ignoras, kiun la scienculoj laŭŝajne senĝene malhavas kaj kiu ne ligiĝas al multjarcenta kulturo.

Kiu miras pri simila lingvolernado, tiu ne konscias, kiel riĉe la humanisma vastkoreco povas regali personon, kiu lasas sin gvidi de ĝi, nek kiom kontentiga povas esti la sento partopreni en ampleksa agado celanta akceli la afektivan maturiĝon de la socio. Por fariĝi plene plenkreska, necesas forlasi kaj infanecan memcentrismon, kaj abstraktan idealon adoleskulan. Nu, en siaj rilatoj kun la vasta mondo, homo renkontas du tentojn. La unua, infaneca, estas la emo sin enŝlosi en siaj materiaj interesoj senperspektive. Se li falas en tiun kaptilon, la individuo fariĝas cinika, kaj tio, kion li kaŝas sub t.n. "realismo", fakte estas nur senkuraĝiĝo post trompitaj idealismaj revoj, aŭ memcentra sin-evolvo sub protekta kokono, ŝirmanta kontraŭ planedaj respondecoj.

La alia tento, tipa pri la aĝo adoleska, konsistas el inklino lasi sinregi de abstrakta idealismo. La kapo plenas per ideoj de sindediĉo kaj la koro batas fervore pri la Tria Mondo kaj la tuta homaro, vibras emocio ĉiufoje, kiam penso venas pri la viktimoj de tiu aŭ tiu diktatoro, de tiu aŭ alia reĝimo diskrim-

inacia. Sed konkrete, praktike, oni faras nenion, kaj oni plu vivetas rutine, kvankam kun obtuza kulposento.

Esperantismo proponas engaĝon, kiu antaŭsavas kontraŭ tiu duobla stumblo, kaj kies efikoj estas ege pli profundaj, ol unuavide ŝajnas. Ĝi evitigas stumblon en cinikan memcentrismon, ĉar temas pri agado, kiu ne kontentigas pure materian intereson proksimtempan, kaj kiu invitas elŝovi sin el la protekta sfereto. Kaj ĝi evitigas stumblon en nebulecan idealon, ĉar ĝi baziĝas sur konkreta realaĵo, enkarneigita en efektiva komunikilo, kiu, se taŭge regata, ebligas dialogi kun difinitaj personoj el ĉiuj landoj kaj sociaj medioj. Nomoj kiel Ĉeĥoslovakio, Japanio, Brazilo, Irano elvokas ĉe la ordinara civitano bildojn el gazeto aŭ programo televida, aŭ eble turismaj memoroj. Ĉe la esperantparolanto, ili elvokas vizaĝon, adreson, interŝaĝon ĉu rektan, ĉu per letero aŭ kaseto. Ĉiam temas pri tio, ke homo renkontas homon, ke kuniĝas personoj kapablaj senpere esprimi sian vivkonceptadon aŭ rakonti unu al la alia, kio ilin ĝojigas aŭ turmentas.

La socio de la dudeka jarcento ankoraŭ devas sperti gravan ekkonsciiĝon. Ĝi multe parolas pri interkultura komunikado, internacia kunlaboro, teknika helpado, k.s., sed ĝis nun ne evidentiĝis al ĝi, ke ĉio ĉi postulas interkomprenilon. Kiel helpi iun, almenaŭ je sufiĉe profunda nivelo, sen havigi klarigojn? Kaj kiel oni povus klarigi, se oni ne disponas komunan lingvon? Ĉu ne estas io sintrotakse senrespekta en la sinteno de tiu, kiu, pretendante helpi aliulon, komencas trudante al li sian lingvan terenon, la mensstrukturojn enkorpigitaĵojn en la propra lingvo, kaj do la tutan propran kulturfonon?

Trudi al birmano, al tajo, al polineziano, al ano el gento bantua, kiuj uzas lingvojn sen konjugacio laŭ la eŭropa signifo de la vorto, lingvon kiel la anglan aŭ la francan, en kiu pritrakti pasintajn aferojn devigas subtile distingi inter "il est allé", "il alla", "il allait", "il sera allé", "il était allé", aŭ "he went", "he is gone", "he has gone", "he was going", "he had gone", "he used to go" ktp. tio estas efektiviĝi premon sur la kunparolanton, por ke li adaptiĝu al mensa gimnastiko nek komunike nek kulture pravigebla. En esperanto, kiel en la plimulto el la lingvoj de l' mondo, ekzistas nur unu paseo, kaj la nuancojn, kiujn ni esprimas eŭroplingve per tre kompleksa konjugacio, oni tradukas per aliaj lingvaj rimedoj, kiel en la lingvoj aluditaj.

Krome, trudi la anglan aŭ francan, estas utiligi lingvon kun diversfaceta fono historia kaj politika, kiu por multaj simbolas humiligon: en la tuta mondo tiuj lingvoj estas asociitaj al memoroj pri ekonomia kaj kultura premo aŭ pri administrado kolonia, kiuj ne igas ilin aparte simpatiaj.

Esperanto, siaflanke, elvokas neniun ideon pri superregado. Verdire, rilate al la potencaj kaj riĉaj, ĝi aspektas ege senhava. Longe malestimita de la intelektuloj, ignorata de la lingvistiko, rigardata desupre fare de la snoboj,

persekutata de ĉiu diktatora reĝimo, ĝi ricevas sian disradiadon nur el la propra kvalitaro, intelekta kaj morala. Neniām ĝin apogis la forto de mono aŭ armiloj, nek eĉ registara rekomendo. Ankaŭ tiurilate ĝi respondas al humanisma idealo. Unu el la bazoj de humanismo ja estas sento pri la digno homa, kune kun volo neniām provi solvi la problemojn perforte. Al forto, humanismo ĉiam preferas la uzon de inteligenteco.

Se ni vere havas la humanisman deziron ekrlati kun la alia, kaj lin koni, nin interesas scii, kion travivas, pensas kaj sentas tiu alikultura homo, kaj komuniki al li aŭ ŝi, kion ni travivas, sentas kaj pensas. Kion alportus al tio neregulaj verboj, akcentoj nefiksaj, gramatikaj genroj, esceptaj pluraloj kaj nekohera derivado? Ĉiu el tiuj arbitraj elementoj inhibicias fremdlingve la spontanee esprimon de la penso, des pli forte, ju pli la gepatra lingvo aliel strukturiĝis. Neniu el ili aldonas ion ajn al komunikado interpersona. Tial la respekto de la persono postulas, ke malsamlingvanoj, kiuj volas rilati inter si, elektu lingvon kiel eble plej liberan je arbitraj elementoj, al kiuj mankas informo valoro. Nur tiel eblas komuniki inter personoj kun malsama gepatra lingvo respektante la integrecon de ĉies kulturaj bazoj.

Tiu rifuzo subpremi, perforti, misformi, kiu kuŝas funde de la ideo pri konvencia lingvo ebliganta al ĉiuj popoloj rilati egalece, estas enplektita en la strukturojn mem de esperanto. Lingvoj kiel la franca, la germana, la angla funkcias kvazaŭ per ediktoj de malnovreĝima centralizema monarko. Kontraste, esperanto estas lingvo kun demokratia, federacia karaktero. En la supre nomitaj lingvoj, la gramatiko emas rompi la vortradikojn, kaj ĉiaspecaj esceptoj abundas, kio signifas, ke la diversaj konceptoj ne havas egalan statuson rilate al esprimeblo. Kiam vi transiras de *voir al invisible*, al *vu*, al *nous vîmes*, al *visuel*, vi difektas, se tiel diri, la fundamentan vorton, tiagrade, ke nur la litero *v* rezistas la diversajn transformojn. En esperanto vi diras *vidi, nevidebla, vidita, ni vidis, vida*, kaj la radiko *vid* restas netuŝata, konstanta, ĉiam respektata en sia propra individueco, kia ajn la rolo en la frazo, kia ajn la koncepto, kiun ĝi helpas naski.

En la okcidentaj lingvoj, la loko de la vortoj estas grandparte arbitre fiksita kvazaŭ de iu centra povo. Se vi parolas france, vi ne rajtas diri *je vois le*, vi nepre diru *je le vois*, kun la komplementa pronomo antaŭverbe; se germane aŭ angle, la ordo estas alia, sed vi ne pli liberas. En esperanto, vi povas diri *mi vidas lin* same bone kiel *mi lin vidas*. Esprimiĝo, en la internacia lingvo, ekestas per kunlaboro de memstaraj unuoj ĉe respekto de ilia fizika integreco kaj de ilia libereco moviĝi.

La praktika rezulto de tiatipa strukturo estas, ke la lingvon oni lernas pli per inteligento ol per memoro. Nu, invito inteligenti ne nur estas pli efika kaj agrabla, ĝi estas krome estimpruvo por la aliulo, kaj maniero lin trakti kiel

plenrajtan homon.

Proponi al kunlaboronto uzi Esperanton, tio estas diri al li: "Mi ne volas, ke vi hontu pri via prononco; mi ne volas, ke vi faru erarojn, kiuj riskas vin igi mokinda; mi ne volas, ke vi balbutu aŭ forlasu nuancojn, ĉar la vortprovizo de mia lingvo estas tro komplika, por ke vi ĝin perfekte regu. Tial mi proponas al vi lingvon, en kiu via loka prononco estos respektata egale kiel la mia, lingvon, kies gramatiko ellaboriĝis tiastrukture, ke vi ne faru pli da eraroj ol mi, lingvon kies vorttrezoro tiagrade sekvas la psikolingvistikajn leĝojn de spontanea eldirado, ke la bezonata vorto prezentiĝos al vi en la sama momento, en kiu via penso formiĝos. Tiamaniere, kiam ni kune parolos, vi ne sentos vin fremdulo."

Kaj efektive, esperanto estas aranĝita tiamaniere, ke la penso, kiam ĝi esprimiĝas, spertas kvazaŭ grandan liberiĝon. Ni forgesis, ke kiam ni estis etuloj, nia maniero paroli karakteriziĝis per lingva kreemo verve disburĝonanta. Ni ne imitis la lingvon de l' plenkreskuloj, ni rekreis ĝin de interne, diserigante la vortojn kaj rekunmetante la erojn laŭ nia fantazio.

Antaŭ nelonge, infano france parolanta diris al mi *une feuille carreautee* ("kvadrata folio"; la ĝusta vorto estus *quadrillée*) uzante vorton, kiun li formis el *carreau*, "kvadratforma desegnaĵo". Alia diris *unibraïste* ("unubrakuĵo") anstataŭ *manchot*, laŭ la skemo analizebla en *unijambiste* ("unukruruĵo"). Tria, kiu ne retrovis la vorton *divorcer* ("eksedziĝi"), kreis *se démarcher* (*se marier* = "edziĝi").

Dum jaroj, infano kreas vortojn kaj gramatikajn regulojn uzante bazan materialon ĉerpitan el la lingvaĵo de pliaĝuloj. Sed iom post iom tiu lingva kreemo malaperas, ĉar la plenkreskuloj klarigas al la etulo, kiam ĝi montriĝas lingve eltrovema, ke tio nomiĝas "erari", kaj la lernejo poste prizorgas la eliminadon kiel eble plej kompletan for de la parolaj kreaĵoj kaj de la persona ortografio.

La gepatroj kaj la lernejo pravus. La infano ja devas asimili ĝustan lingvouzon kaj lerni korekte manipuli la nacian aŭ regionan idiomon. Lia estonteco parte dependos de taŭga posedo de la lingvo gepatra. Tamen, estas domaĝe tiel nulvalorigi senkompense la lingvan kreivon de etulo.

Esperanto ebligas trovi tiun fundamentan kreemon sen eĉ iomete malutili al la regado de la lingvo gepatra. Unu el la spertoj, kiuj plej frapas la Esperanto-instruistojn, estas vidi la plezuron, kiun montras plenkreskuloj, kiam ili produktas vorton ĵus elpensitan aplikante la bazajn regulojn de Esperanta vortfarado — ili similas al tiuj, kiujn sekvas la spontanea lingvokreado de infano — kaj ĝoje konstatas, ke oni tuj komprenas ilin. Tiu plezuro remalfermas al ili pordon ŝlositan en la infanaĝo, kaj tio estas psika riĉiĝo, kiun oni ne subtaksu.

Sed plej interesas nin ĉi tie observi, ke tiu infana lingvoformado disvolviĝas laŭ la samaj leĝoj en la tuta mondo. Kompreneble, la konkretaj formoj diferencas laŭ la infano, sed la maniero ilin produkti estas ĉie identa.

Kiam oni uzas komparan lingvistikon, oni komence miras pri la diverseco de la homaj lingvoj. Sed se oni profundiĝas en la studo, oni baldaŭ rimarkas, ke tiu supraĵa, forma diverseco kaŝas rimarkindan identecon je pli profunda nivelo.

Kio komuna estas, genetike kaj kulture, inter malajo, irano, germano, japano kaj marokdevena israelano? Nemulte, aŭ nenio. Tamen en la lingvo de ĉiu el ili la vorto, kiu signifas "malsanulejo", "hospitalo", formiĝas ekzakte sammaniere, laŭ la skemo de la germana *Krankenhaus*. Kio komuna estas, historie, inter franco, ĉino kaj orientzairiano? Nenio. Tamen, en iliaj lingvoj, la vorto "nevidebla" konsistas el la samaj elementoj: unu, kiu esprimas la neon, unu la vidon, kaj unu la eblecon.

Igante la vortfaradon eksplicita, Esperanto senpere kondukas al io universala en la procezo, laŭ kiu la homa menso analizas la realon. Ĝi kaptas la koncepton je la nivelo, kie ĝi formiĝas, kaj tiel estigas samtempe pliprofundiĝon kaj plivastiĝon: pliprofundiĝon, ĉar ĝi malsupreniras al nivelo pli baza ol tiu de la formoj uzataj en la etnaj lingvoj; plivastiĝon, ĉar ĝi malkovrigas, ke nia maniero nin esprimi, se oni forskrapas la eksteran tegaĵon, vastiĝas al la tuto de la gentoj de l' mondo. Ankaŭ ĉirilate Esperanto montriĝas perfekte humanisma: tiu duobla ampleksiĝo, vertikala kaj horizontala, ja igas pli bone koni, pli bone kompreni la homon.

Sed se Esperanto atingas nivelon pli universalan ol la ceteraj lingvoj, tio ne fariĝas abstrakte, sed laŭ tre konkreta sistemo. Vortojn ĝi uzas, ne konceptojn, kaj ili havas propran individuecon muzike, ritme, origine kaj etose.

Se oni trovas ĉiulingve universalan analizon de la realo, oni ĉie trovas ankaŭ enlingviĝon de tiuj apartaj kulturo, historio, maniero pensi kaj senti, kiuj distingas ĉiun popolon de ĉiu alia, tiel ke necese ekzistas en ĉiu gento ne-tradukeblaj nocioj.

La baza vortprovizo de Esperanto konsistas el pruntoj; sekve, la vortoj transiris al la internacia lingvo portante kun si la plimulton el la harmonioj de la origina idiomo. Kiam esperantparolanto diras "kreteno", la etoso de l' vorto estas pure franca, sed kiam li diras "hejma", li elvokas tipe germanan atmosferon, tiun varman rilaton al la domo, al la familio, kiun neniu franca vorto povas esprimi. Kaj kiam li diras "klopodi", por esprimi iun strebadon, iun penadon direktitan al difinita celo, li vivigas tutan kulturalan mondon specife slavan.

Videble, universaleco, ĉe esperantisto, ĉiam estas enkarnigita en io individua, konkreta, vivanta. Jen eble kial multaj esperantistoj tiel forte korigiĝis

al la propra vivloko. Ili estas homoj, kiuj amas sian regionon, kaj kiuj amas ĝin amigi.

Similan rimarkon eblas fari pri literaturo. Esperantparolantoj ŝatas diskonigi la belaĵojn de sia kulturo. Pro tio ili tradukadis, refoje ame, la plej rimarkindajn tekstojn, kiujn produktis la verkistoj de ilia gento. Kiu, se ne esperantisto, povas legi el tradukoj same fidelaj kiel la internacilingvaj svedan poezion, hungaran teatran repertuaron, historiajn tekstojn japanajn kaj la grandan epopeon de la literaturo argentina? Apenaŭ Esperanto penetris en Afganistanon, kiam notinda slovaka antologio aperis en la internacia lingvo. Mi ne scias, ĉu la junaj afganaj esperantistoj deziros legi la verkojn de tiu kolekto, sed se jes, ili povos tion fari. Esperanto malfermas al ili la pordon de literatura mondo, al kiu nek la gepatra lingvo, nek la angla, se entute ili lernis ĝin, ebligas ilin akiri.

Mi foje vizitis italan esperantistan laboristaron, kiu loĝis en speco de kabineto, kie nek flua akvo nek elektro haveblis. Sur la unusola librobreto videblis i. a. libro de estona literaturo, fabelaro rekte esperantigita el la bengalia kaj unu sudamerika verko. Tiun saman kulturan diversecon mi retrovis multokaze, ekzemple en la salono de ĝeneva esperantistino, kaj en ĉina singapura hejmo, ĉe esperantisto, kiu estis submastro en fabriko de biskvitoj.

Ĝoji, suferi, dubi, ami, malami, timi, angori, esperi, tiuj estas universalaj homaj spertoj. Sed la formoj, laŭ kiuj ili manifestiĝas, la situacioj, kiuj elvokas ilin, la reagoj de ili kaŭzataj diferencas laŭ la socio, laŭ la persono. Konatiĝi kun la literaturoj de l' mondo, signifas ekkoni samtempe la universalecon kaj la diversecon de la homo.

Kulturoj estas kiel homoj. Ĉiu el ni havas vizaĝon, sed neniu havas vizaĝon identan kun iu alia. La esperantista humanismo konsistas grandparte el jeno: malkovri la vizaĝon, kiom ĝi estas aparta, unika, neanstataŭigebla, sed malkovri ankaŭ, ke ĝi estas homa vizaĝo, kiu, estante tia, povas esti konata, komprenata kaj ŝatata, tiel ke renkonte povos esti la deirpunkto por labori kune, interŝanĝi konfidencojn, aŭ partopreni en komuna zorgado, kaj sekve la bazo de morala pliriĉiĝo, kies valoron subtaksi ne eblas.

Tiu deziro konigi la homon sub ambaŭ aspektoj, universala kaj unika, naskis en la mondo malmulte konatan kulturan fenomenon: originalan literaturon, kies lingva portanto estas Esperanto.

Ekde kiam la lingvo aperis, tiuj, kiuj lernis ĝin, sentis la bezonon ĝin uzi literature. La verkoj, komence mallertaj, pli kaj pli perfektiĝis, kaj kelkaj grandaj poetoj kaj prozuloj transformis la iom rigidan kodon de la komenca periodo al lingvo ekstreme fleksebla, verva kaj esprimriĉa. La ĝenerala publiko tion ne scias. Ĝi imagas, ke Esperanto estas nun tia, kia ĝin proponis Zamenhof. Estas erare. Kelkaj literaturistoj aparte talentaj forte influis la lingvon,

kaj povi profiti de ilia ama flegado estis por Esperanto gravega bonŝanco.

La celo de Esperanto estas servi kiel ponto inter diversaj kulturoj. Eble tial la homoj, kiuj originale verkas tiulingve, ofte pritraktis temojn plurnaciajn aŭ plurvidpunktajn. Ekzemple, pluraj romanoj de la hungaro Baghy temas pri la rusa enlanda milito, kiun la aŭtoro travivis en Siberio, kaj prezentas la eventojn egale el ruĝpartia kiel el blankpartia vidpunktoj. La ĉefverko de la franco Raymond Schwartz, *Kiel akvo de l' rivero*, disvolviĝas jen en Francujo jen en Germanujo dum la du mondmilitoj, sed la situacioj estas, se tiel diri, perceptataj de interne laŭ perspektivo jen germana jen franca. Ne estas dubo pri tio, ke la originala esperanto-literaturo prezentas per si gravan kontribuon al vera humanismo, rigardata kiel esence universaleca.

Per sia naturo mem, humanismo implicas tendencon superi la landlimojn, kaj precize pro tio inklinas al universaleco. Multaj formoj de humanismo, en la historio, utiligis lingvon, kiu ne apartenis, aŭ ne plu apartenis, al nacio, kiel la *ŭenjan* (malnova nur skriba ĉina lingvo) en Ekstremoriento, la sanskrita sur la hinda subkontinento, aŭ, en Eŭropo, la latina. Tiel la membroj de la elitoj sur vastaj partoj de la mondo interkomunikis sen senti sin fremdaj inter si.

Niaepoke, la publika instruado kaj la teknikaj komunikrimedoj tiel disvolviĝis, ke uzi internacian lingvon rezervitan al elito kaj al nur parto de la terĝlobo estus arĥaika. Krome, la klasika humanismo, se ne korektita iamaniere, prezentas la riskon instigi al retrofuĝo en la pasintecon. Sed la ideo, ke homoj devas povi renkontiĝi kiel homoj, kia ajn la gepatra lingvo, neniel perdis sian aktualecon.

Se la homoj ne estu fremdaj unu por la alia, necesas strebi al tio, ke ili renkontiĝu kiel egaluloj sur la plej specife homa tereno, la tereno de dialogo, de interkomunikado, por ke ĉiu, konservante la proprajn lingvon kaj kulturon, povu kontakti aŭtente la reston de la mondo sen devi novvesti sin per alilanda identeco.

Intereso al la homoj en la eksterordinare diversaj situacioj, en kiuj ili troviĝas, allogo por la bunta kultura panoramo, kiun la homaj socioj naskis, respekta konsiderado al la anoj de aliaj gentoj kaj sociaj klasoj, rigardataj kiel egalaj al ni laŭ digno, kiom ajn ili diferencas de ni: jen la bazaj sintenoj, kiujn disvolvas la esperantista humanismo.

Kredi, ke tiuj sintenoj povos rapide disvastiĝi al la tuto de la homoj, aŭ eĉ nur ĉe tiuj, kiuj, en la mondo, forĝas la publikopinion, estus fali en bedaŭrandan utopion. Por ami la homfraton, kaj senti por li la konsideradon postulatan de la humanisma sinteno, kiu konkretiĝas en Esperanto, necesas ne timi lin, kaj ankaŭ ne timi malkovri, kio ni estas. Ĉar superi tiajn limojn ne estas facile, retiriĝo en sin, etnocentrismo, fuĝemo antaŭ la risko ekvidi en la aliulo, pro la reciproka ĝisfunda kompreno, ion, kio povus vekti en ni sindemandojn

pri la propra praveco, ĉio ĉi estas multe tro forta en la socio, por ne mobilizi gigantan potencialon de antaŭjuĝoj, malestimo kaj indiferenteco kontraŭ la progreso de Esperanto kaj de la pensmaniero, kiun ĝi respiegulas. La moderna socio multrilate similas ĝangalon, kie estas tro urĝe defendi kaj kreskigi la konkeraĵojn, por ke oni havu la tempon starigi al si la demandojn, kiujn devus naski aŭtenta humanismo.

La esperantistoj neniel kalkulas kun rapida progresado aŭ kun la ĝuo agnoski venkon post venko. Tamen ili plu strebas persiste. Preskaŭ jarcento da historio internacilingva ja ebligis konstati, ke neniam la humanismo, kies portantoj ili estas, ĉesas altiri vivajn fortojn. La homo estas indiferenta kaj egoisma, jes ja, sed ankaŭ sindonema kaj larĝmensa. Kio estas malsama kaj nekonata timigas, jes ja, sed ĝi ankaŭ allogas. Neniam Esperanto interrompis sian malrapidan, sed konstantan progresadon. Ĝi penetris en Madagaskaron antaŭ apenaŭ jardeko, kaj nur antaŭ tri monatoj okazis la unua Esperanto-kongreso pakistana. Jes, Esperanto trankvile iras sian paŝ-post-paŝan pluiradon. Kaj tio sufiĉas por pravigi la penojn dediĉatajn al ĝi.

## Fremdlingva orientado pere de Esperanto.

Helmut Sonnabend

Fremdlingva orientado en la senco pli bone kompreni iun ajn fremdan lingvon signifas: *ebligi al la lernanto la klarajn ekkonon kaj komprenon kiel kvazaŭan travivon de modela lingvo el ĝia radiko ĝis ĝia harmonia disbranĉiĝo.*

Nia konstanta problemo ekde la fino de la dua mondmilito estas ekzemple instrui la anglan lingvon al ĉiuj infanoj. Ankoraŭ antaŭ la dua mondmilito la lernado de fremdaj lingvoj estis dediĉita nur al geledantoj en gimnazioj kaj mezgradaj lernejoj. La kono de fremdaj lingvoj estis la privilegiita etiketo de la pli alta socia tavolo.

Ĝis kia grado siatempe oni lernis la lingvojn, statistike ne estas registrita. Tamen, kiu iom atente observas la fremdlingvan interkompreniĝon, konstatas ke krom la etiketo ne multas la substanco.

Kompreneble ne nur lingvopolitikaj pretendoj kaŭzis la ĝeneralan instruadon de fremdaj lingvoj: en orienta Eŭropo la rusa, en nordokcidenta Eŭropo la angla, kaj en la sudokcidenta la franca lingvo kaj ankaŭ la germana, sed same la vera bezono al lingva interkompreniĝo.

La angla lingvo estas fakto en germanaj lernejoj kaj certe ankaŭ en multaj lernejoj ekster Germanio. La malnova metodiko ne konis la zorgojn de la nova. Ĝi povis konsideri sufiĉan lingvan talenton aŭ almenaŭ eksterlernejan apogon fare de la gepatroj aŭ perhelpe de privataj instruistoj.

Kiu pristudas aŭ almenaŭ trafoliumas modernajn lernolibrojn ekkonas la grandan ŝanĝon en la prezentado de la lingva materialo, abundas la akompana instrumaterialo, same la teĥnikaj eblecoj. Sed la fremda lingvo devas ekesti en la kapoj de la infanoj, ĝi devas formiĝi parole sur la lango kaj finfine fariĝi lingva parolo. Jen estas la vera problemo, ĉar nun alfrontas nin ĉiuj infanoj – lingve talentaj kaj malpli talentaj.

Ni uzas pedagogie ŝajne certigitan paŝon: la diferencigo almenaŭ laŭ A-

kaj B-grupoj. Estas notinde, ke gimnazio ne uzas tiun klasifikon, ankaŭ ne la mezgradaj lernejoj. Kiam ni nur supraĵe ordigas la instruadan strukturon, ni povas distingi gimnazian anglan lingvon, anglan lingvon de mezgradaj lernejoj kaj la anglan lingvon de ĉeflernejoj klasifikita en A-angla kaj B-angla lingvo. Multaj lingvopedagogoj diras al mi, ke B ankoraŭ estus tro ampleksa kaj oni devus pli diferencigi.

Sajnas al mi, ke tiu ĉi vojo al lingva interkompreniĝo estas pli ol duba.

Kion fari?

En Malsupra Saksio la anglalingva instruado estas entenata en la tabelo de studobjektoj por la Elementa lernejo – ekde la tria klaso. Pluraj lernejaj eksperimentoj jam okazis. Ĝenerale la konkludoj estas jenaj:

- konsideri la situon de duagradaj lernejoj por senpere daŭrigi la anglan lingvo-instruadon,
- en la Elementa lernejo devas esti sufiĉa nombro da instruistoj kun anglelingva fakulto,
- organizi lokajn kursojn por intersanĝi spertojn,
- ebligi la partoprenon en lingvaj kursoj okazontaj en Britio,
- esplori, ĉu eblas dungi britajn asistantojn,
- necesas, ke instruistoj de duagradaj lernejoj antaŭe informiĝu pri la anglelingva instruado en la triaj kaj kvaraj klasoj, por eviti la didaktikan kaj metodikan rompon,
- teste konstati la lingvan konon de la lernantoj antaŭ ol ili transiros al alia lerneja sistemo.

Do, la problemo ne nur estas la infano, sed pli la instruisto. Se ni efektive je favoro de nur unu lingvo decidus fari ĉiujn fortajn streĉojn, ni ankaŭ devus postuli, ke ĉiu instruisto de elementa lernejo samtempe estu la lingvo-instruisto. Ni evitu, ke niaj infanoj inter ok kaj naŭ jaroj jam suferu la fakinstruistan sistemon!

Ni esploru iom alian demandon! Ĉu la frua lernado de la angla lingvo estus por niaj infanoj vere utila? Inter pluraj konsideroj kiuj kontraŭas la frulernadon mi nomas du:

1. La infanoj ne egale lernas la anglan lingvon. Post kelke da semajnoj montriĝas, ke pluraj infanoj bone kaptas la novan lingvon, facile prononcas ĝin kaj bone regas rolojn en lingvaj ludoj. Aliaj pli malpli lernas, sed ofte silentas. Sed estas pluraj, kiuj ne komprenas, ne kapablas fari utilajn paŝojn. La instruisto tre baldaŭ scias grupigi siajn infanojn laŭ iliaj kapabloj. Je la fino de la Elementa lernejo ĉio estas klara: infanoj por la gimnazio, mezgrada lernejo, ĉeflernejo: A-klasoj kaj B-klasoj.

Sed post la Elementa lernejo sekvas la Orientiĝa Ŝtupo – tre nova tipo de nia lerneja sistemo. Ĝi havas la taskon doni al la infanoj la eblecon sinorienti en matematiko kaj en la angla lingvo. Sed multaj infanoj jam antaŭe konstatis, ke la angla lingvo malfavoras ilin. Jam en la elementa lernejo ili perdis siajn ŝancojn por viziti gimnaziojn kaj mezgradajn lernejojn.

2. La gepatroj hodiaŭ ofte ŝanĝas pro profesiaj kaŭzoj sian loĝlokon. La lernejoj de federaciaj landoj ne estas unuecaj.

La mikskoloraj klerigenhavoĵoj ne nur incitis la federacian registaron. Trafita ankaŭ estas la fremdlingva instruado. La angla lingvo ne ĉiam estas la unua instruata lingvo. Se ni emfazas konstante samajn ŝancojn por ĉiuj infanoj, ni nepre ordigu la fremdlingvan instruadon antaŭ ĝia oficiala enkonduko en la Elementan lernejon.

Ĉu nun entute estas konsilinde ne instrui fremdan lingvon? Ĉu ni povas lasi ĉion kiel ĝis nun? Kial niaj infanoj jam eklernas matematikon en la unua klaso? Por lerni elementojn de la matematiko. Kial niaj infanoj lernas la unuajn gramatikaĵojn de la propra lingvo? Por ekkoni la fundamentojn de la lingvo. Tial ankaŭ ili jam renkontiĝas kun geografiaj, biologiaj, historiaj, fizikaj temoj. Manlaboro, sporto kaj multaj aliaj aferoj riĉigas la vivon en la Elementa lernejo.

Tiel bone preparitaj niaj infanoj transiros al duagradaj lernejoj kaj ĉiuj fakoj tie estas al ili malfremdaj. La infanoj plene trankvile daŭrigas sian lernadon. Nova por ili estas la fako fremdlingvo. Ĝi estas efektive tiel fremda kiel la fako mem. Mankas ĉiuj bazaj elementoj kaj fundamentoj.

Ĉiuj lernpsikologiaj teorioj pruvas, ke la instruado de fremdaj lingvoj estas des pli efika ju pli frue ĝi okazas. Se ne estas konsilinde instrui la anglan lingvon, tiam ankaŭ ne la francan aŭ la rusan aŭ la germanan. Certe ili restos ankoraŭ por pli longa tempo la cellingvoj en la diversaj regionoj de la mondo.... Ni bezonas por niaj Elementaj lernejoj modelan lingvon kiu estas malferma al plej eble multaj fremdaj lingvoj. La mekanismo de tiu ĉi lingvo devas esti tiel simpla kaj samtempe tiel trafa, ke la infanoj ekkonu la internan strukturon de funkcia lingvo. La infanoj lernu “*ĉio estas lingvo*” tiel klare ĝis la epiteto “fremda” perdiĝas. Tiu modela lingvo devas havi klaran sonsistemon, t.e. ĉiu sono devas esti klare difinita. La ortografio ne malfaciligu la skribon, do la ortografio devas rilati al la sonsistemo. Jen estus granda avantaĝo rilate la nacian ortografion: la malkovro de la rilatoj inter sono kaj signo!

Tiu modela lingvo plue devas posedi riĉan vorttrezoron. Ĝi donus tuj du avantaĝojn: kiam la infanoj lernos la devigajn fremdajn lingvojn, ili jam konas multajn vortojn troviĝantajn same en aliaj lingvoj; krome ili ekkonos

la parencecon inter la lingvoj.

Kiu lingvo plenumas tiujn kondiĉojn? Kiu lingvo povus servi por lingva orientado? Kiu lingvo helpas pli bone lerni aliajn fremdajn lingvojn? Kiu lingvo donas al ĉiuj infanoj veran klerigŝancon?

La lingvo Esperanto plenumas fakte ĉiujn kondiĉojn. Internaciaj testoj en pluraj landoj kaj diversaj lernejoj esploris tutan aron da kriterioj. Ĉiuj analizoj estas pozitivaj.

Tamen mi avertas antaŭ la opinio, ke Esperanto nur estas instrumento de la lingvodidaktiko. Ĝi estas lingvo kun ĉiuj konsekvencoj. Lingva orientado ankaŭ signifas ĝian lernadon. Post kelke da semajnoj ekestos la unuaj internaciaj kontaktoj. La infanoj baldaŭ ekkonos ĝian komunikan valoron kaj malkovros la vastan internaciecon de tiu ĉi lingvo.

## Ekde 1981: Esperanto en gimnazioj.

Kalotai Judit

*Kun ĝojo ni komunikas al vi, ke Esperanto estas akceptita far la instrureformo ankaŭ en la gimnazioj kiel elekteble tria fremdlingvo. Vidu la leteron n-ro 22.011/1978 de la Ministerio pri Instruado. Ĝin subskribis dr. Komoroczky Sándorné, estro de mezlerneja ĉefsekcio. Tiu letero nomas tiujn fakultativajn lernobjektojn, kiuj estos laŭlekte sed devige instruataj en la 3a kaj 4a klasoj. En la listo la unuan lokon okupas Esperanto (kiel tria lingvo). La leteron ricevis ĉiu gimnazia direktoro.*

Pedagogia cirkulero de Instrua Komisiono de HEA.

La sciigo atingis nin neatendite kaj surprize. Tiuokaze ni petis intervjuon de tiu, kies merito estas tiu ĉi eksterordinara rezulto: de profesoro Szerdahelyi.

– Ĉu ĝi estas venko?

– Ĉu venko? Ne, tro granda venko ĝi estas. Ĝi estas rezulto de longjara klopodado kaj ĉiama, kontinua kaj senintermita argumentado.

– En la Akademia Komisiono, kiu antaŭpreparas la ĝeneralan lernejan reformon vi reprezentis Esperanton. Ĉu vi estis sola, aŭ ĉu vi havis helpantojn?

– “Videblajn”, senperajn helpantojn mi ne havis. La plej granda parto de la membroj estis aŭ kontraŭa, aŭ indifera rilate la internacian lingvon. Estas karakterize, ke, kiam mi faris mian plenan raporton pri la temo parto

el la membroj ekstaris kaj manifestacie forlasis la kunvenejon. Du-tri kolegoj bonvoleme alparolis, sed tro decide apogi min ili ne kuraĝis.

– Tamen vi sukcesis...

– Ne. Mi fiaskis. Mi fiaskis, ĉar mi proponis enkonduki Esperanton ne en la mezajn lernejojn, sed, kiel propedeŭtikan lingvon en la bazajn lernejojn.

– Kiel tamen okazis, ke la Ministerio tiel decidis?

– Estas lingvo-politika demando. En la bazaj lernejoj ne povas esti du fremdaj lingvoj. Sed la reformo ebligas instrui du, eĉ tri lingvojn en la meza lernejo. Tial mia fiasko estas nur parta: mi fiaskis en la baza lernejo, sed mi sukcesis en la meza.

– Kiun signifon vi atribuas al tiu nova rezulto?

– Eksterordinare kvalitan [kaj ne kvantan!] signifon. Okazas la unuan fojon en la historio de nia lerneja sistemo, ke Esperanto havos oficialan programon, oficiale eldonotajn instru-fontojn [instruistan gvidlibron, lernolibron, magnetofon-bendon, diafilmserion ktp], eniras en la liston de la oficiale instrueblaj lingvoj apud la rusa, angla, germana, franca, hispana, itala kaj latina. Pripensu: en la hungaraj mez-lernejoj oni instruas ok lingvojn, kaj unu el inter ili estas Esperanto. Ĉu tio ne estas eksterordinara evento?

– Vi diris “kvalitan”. Kaj kvantan tute ne?

– Eble ankaŭ kvanta altiĝo povas okazi, sed pri tio mi nun ne estas konvinkita. Oni povos ĝin instrui nur en tiuj lernejoj, kie funkcias ŝtate diplomitaj mezlernejaj pedagogoj. Ĉe ni diplomiĝas kvar, kvin studentoj jare. Ekde nia funkciado ni havas iom pli ol trideko da diplomitoj. La nova situacio efikas pozitive ankaŭ en la universitato. Povas okazi, ke estonte pli da studentoj alprenos la fakon. Sed pri tio mi ne estas tute konvinkita. Ni vidos.

– Vi parolis pri programo kaj instrufontoj. Ĉu ili jam ekzistas?

– Jes, parte. Sed kiel! La 20an de oktobro per telefono oni mendis de mi la programon kun la limdato je la 1-a de novembro. Tuj post la programo [precize: la 6an de novembro] oni mendis ĉe mi la lernolibron por la tria klaso de la gimnazio [unua studjaro por Esperanto] kun la limdato je la 8a de decembro.

– Ĉu eblas verki lernolibron dum unu monato?

– Post multaj verkitaj de mi lernolibroj mi povas tutkonscie deklari ke ne.

– Kaj ĉu vi tamen faris kun la Pedagogia Instituto kontrakton?

– Mi estis en tia situacio, ke mi ne povis ne fari. Nome: se nun mi ne estus akceptinta, la lernolibro ne estus povinta aperi en la sekva, nur en iu postsekva jaro, sed ankaŭ tiam ne tute certe. La Instituto intencis instrui laŭ mia *Esperanto 1*. Sed pri ĝi mi scias, ke en gimnazio ĝi ne taŭgas. Mi falis do en tian teruran situacion, ke mi devis subskribi la kontrakton por savi la situ-



acion...

— ...des pli, ke neniu krom vi estus povinta tion fari. Mi tutkore dankas vin.

## Enkonduko al la programo.

d-ro István Szerdahelyi

La internacia lingvo Esperanto estas la rimedo de mesaĝkomunikado, informiĝo kaj informado en la internacia inform-trafiko. Ĝia celo kiel instruobjekto estas kontribui per siaj specifaj rimedoj al la ĝeneralaj instru edukaj celoj de la gimnazio.

La specifaj trajtoj de Esperanto estas la jenaj:

- a. ĝi estas internacia lingvo, sekve:
  - a. ne havas etnan medion, do ĝi estas politike neŭtrala;
  - b. ne havas gepatrolingvan komunumon, tial en la internacia trafiko ĝi plenumas helplingvan funkcion;
- b. ĝi ne elformiĝis historie, sed estas laŭplane kreita, tial:
  - a. ĝia leksiko konsistas el la internaciaj vortoj, troviĝantaj en la plejparto de lingvoj;
  - b. ĝia gramatiko estas formaligita: ĝi estas la minimumo-modelo de la hindoeŭropaj lingvoj.

La konataj komponantoj de la socialisma personevoluigo estas *la personigo*, t.e. evoluigo de individuaj kapabloj kaj trajtoj; *la socialigo*, t.e. la akomodigo en la socio, kaj *la klerigo*, t.e. la socia, intelekta riĉigo. Al la plenumo de tiuj taskoj devas kontribui ankaŭ Esperanto kaj paralele evoluigi la fremdlingvajn aktivecojn, nome la komprenon kaj parolon, la legon kaj la skribon, kiel la bazajn formojn de la informaj-komunikado. El la kompleksa karaktero de la lingvo sekvas ke ankaŭ la lingvoinstruado havas kompleksan taksosistemon:

- 1: praktikan,
- 2: klerigan, kaj
- 3: edukon.

La ĉefa tasko estas la alproprigo de parola kaj skriba lingvouzo. Tiu ĉi

## Komuna resumaro de sciencaj revuoj.

B. Frank Böhringer

*Homo kaj Informo, komuna resumaro de diverslingvaj sciencaj revuoj.* La resumoj estas aŭtentikaj tekstoj skribitaj far la aŭtoroj de la koncernaj originalaj publikaĵoj diverslingvaj. Se mankas post la resumo sciigo pri tradukisto, la resumo estas originale verkita en la internacia lingvo.

Frua subtenado per instruteĥnologio.

Steg, Doreen et al.: *Frühförderung durch Unterrichtstechnologie: Ein Bericht über ein Sechsjahresprojekt zur kognitiven Entwicklung (1970-1976)*, [Frua subtenado per instruteĥnologio: Raporto pri sesjara projekto rilate la kognitivan evoluon (1970-1976)], *Kybernetik und Bildung* III, 1977, pp. 93-99.

Ni jen resumas la rezultojn de vertikalesploro komenciĝinta antaŭ sep jaroj. La esploro okazis kun dekkvin infanoj el la malsupra tavolo. La origina plano estis, evoluigi por infanoj 3- ĝis 5-jaraĝaj frulego- kaj parolprogramojn laŭ klerigteĥnologia bazo. Sekve ni intencis pluobservi tiujn infanojn en la baza lernejo por konstati postajn efikojn de la teĥnologia bazita fruinstruado sur lernejaj atingoj.

La procedo konsistis el ĉiutagaj ekzercoj ĉe komputor-asistaj "parolanta tajpilo" kaj "parolanta paĝo". Ni speciale observis la aŭdan kaj vidan perceptadojn, duarange litero- kaj vort-ekkonadon. Fine de tiu trifaza instruovo la infanoj helpe de la lernitaj vortoj rakontis proprajn rakontojn, kiujn ni poste programigis por la instruiloj.

Komence kaj fine de ĉiu jaro en Early Childhood Center, poste fine de ĉiu unuopa lernejojaro ni testis la infanojn por ricevi datenojn pri ilia intelekta evoluo, ilia perceptokapablo kaj iliaj parol- kaj leg-kapabloj. Jen kelkaj el la iom signifaj ĝeneraligeblaj eltrovoj ĉe la infanoj el la malsupra tavolo:

1. — Signifike pozitiva korelato ekzistas inter la tempo pasigita ĉe la

instruaŭtomato kaj la restad-daŭro en la Early Childhood Center unuflanke, kaj la plipostaj povumoj en matematiko, vort-ekkono kaj lego-kompreno.

2. — Inter la ŝanĝigo de la inteligentec-kvociendo kaj la lernkresko ne ekzistas signifa korelado.

3. — Ankaŭ inter la inteligent-kvociendo kaj la atingita povumo ne ekzistas signifa korelado.

4. — Tute sendepende de la komencaj inteligentec-testo kaj percepto-testo rilate ties rezultojn (la inteligentec-kvociendo atingita en la antaŭtesto estis 71,8) tiuj infanoj atingis ĉe pli postaj lego- kaj matematiktestoj minimume sammulte kiel la mezumo de ilia aĝgrupo,

Adreso de la aŭtoro: prof. d-ro D. Steg, 33rd and Market Streets, Philadelphia 19104 Usono. Esperanto-traduko: Goar Engeländer.

### La anticipo de instruefiko kaj de la tempobezono.

Frank, Helmar: *Die Lehrerfolgs- und Zeitbedarfsprognose mit dem  $\beta$ - $\eta$ -Diagramm* [La anticipo de la instruefiko kaj de la tempobezono surbaze de la  $\beta$ - $\eta$ -diagramo], *GrKG* 18/2, 1977, pp. 45-56.

La daŭro  $t$  de la instruado de instruaĵo dividite per ties informenhavo  $I$  estas nomata malkoncizeco  $\beta$  de tiu instruado. Same kiel la efikanco  $\eta$  (t.e. la kvociendo de la teorie minimuma instrutemo per la samsukcesa reala) ankaŭ  $\beta$  dependas ne de la lernanto sed pli-malpli nur de la tipo de la instrusistemo (t.e. la instrumaniero kune kun la instruilo), se retrokuplado de la lernsistemo al la instrusistemo dum la leciono mankas aŭ ne gravas. Mezuri  $t$ ,  $I$ , la laŭprocentan antaŭscion  $p_0$ , la laŭprocentan scion  $p_t$  atingitan dum la instruado kaj la lernrapidecon  $C_v$  de la lernantoj ebligas elkalkuli la koordinatojn  $\beta$ ,  $\eta$  de la karakteriza punkto de la uzata instrusistemo en kartezia koordinatsistemo nomata  $\beta$ - $\eta$ -diagramo. Inverse el tia punkto kalkuleblas  $t=\beta I$  kaj

$$p_t = 1 - (1 - p_0) \cdot e^{-C_v \beta \eta}$$

La kontribuo de la instrusistemo al la instruefiko dependas nur de la produkto  $\beta\eta$ . La klasika prelego havas pli-malpli la saman, malgrandan produkton  $\beta\eta$  kiel perkomputore programitaj instrusistemoj. La duoblan  $\beta\eta$  havas *kaj* la tradicia klasinstruado, *kaj* aŭdvida, paralela instrumaŝino programita laŭ la t. n. v-t-didaktiko.

Adreso de la aŭtoro: prof. d-ro Helmar Frank, Rolandsgärten 2, D-4790 Paderborn, FRGermanujo. Resumo originale verkita.

### Semantikaj retoj en komputor-subtenata instruado.

Brunnstein, Klaus: *Semantische Netze im computer-gestützten Unterricht* [Semantikaj retoj en komputor-subtenata instruado], *Kybernetik und Bildung* III, 1977, pp. 118-129.

Post enkonduka pravigo, kial metodoj por la informhavigo en la komputor-subtenata instruado estas esplorataj, oni enkondukas la terminon “inform-retoj” (aŭ “semantikaj retoj”) kaj komentas ĝin per diversaj ekzemploj. Sekvante oni klarigas, kiel surbaze de tiaj retoj oni povas ebligi naturlingvan komunikadon alpreninte sintaksajn regulojn. Estas pritraktata la propono de K. Haefner, kunligi informretojn kaj metododeponejojn. Poste oni diskutigas kelkajn rimarkojn pri prezento kaj uzo de statika kaj proceza scio. Fine estas atentigate pri la neceso de “moderna” informteorio, kiu klopodas harmoniigi sciojn de kibernetiko, informadiko kaj dokumentad-sciencoj inter si.

Adreso de la aŭtoro: prof. d-ro K. Brunnstein, Schlüterstr. 66-72, D-2000 Hamburg 13, FRGermanujo. Esperanto-traduko: Goar Engeländer.

### Pri la valoro de redunda informo.

Krah, Wolfgang: *Zum Wert redundanter information* [Pri la valoro de redunda informo], *GrKG* 18/2, 1977, pp. 57-60.

Redunda informo estas valora por la adresato nur tiam, kiam la elspezo (1) por lia akiro estas pli malalta ol la elspezo (2) por atingi ĝin el memoro. Oni trovas kiel elspezodeterminajn faktorojn rilate (1): la elspezon de tempo, la elspezon de aktivecoj ĉe la akiro de la informo kaj la prezon de la informo. Rilate (2): elspezon por la serĉado de la informo en la memoro, la elspezon de la transporto, la elspezon por la transformo de la informo en aliajn lokotempajn, lingvajn kaj logikajn informojn. La praktika utilo de la mezuroj de tiuj ĉi partaj elspezoj estas montrita per diversaj ekzemploj. Pli detale oni pritraktas la problemon de la optimuma redundo de tekstoj direktitaj al specialaj legantoj.

Adreso de la aŭtoro: D-ro W. Krah, Quakenbrücker Strasse 10, D-4558 Bersenbrück, FRGermanujo. Esperanto-traduko: Brigitte Frank-Böhringer.

### Kulturo kiel sistemo de signoj.

Pawlowski, Tadeusz: *Kultur als System von Zeichen* [Kulturo kiel sistemo de signoj], *GrKG* 18/1, 1977, pp. 12-18.

Per la transmeto de semiotikaj terminoj kaj metodoj al la kampo de la kulturaj fenomenoj la reprezentantoj de la semiotika aliĝmaniero esperas gajni la sekvontajn avantaĝojn: (1) Tiel eblas egala pritrakto de ĉiuj kulturaj fenom-

enoj helpe de precizaj semiotikaj metodoj. (2) Tio ebligas tiri science pravigitan limon, kiu disigas la kulturajn fenomenojn de la naturaj. (3) Tio liveros sciencan teorion por la klarigo de kulturaj fenomenoj.

Ĉu tiu ĉi espero estas pravigita? Ĉu la semiotika aliĝmaniero liveros la atendatajn rezultojn? La respondo devas esti "ne" klare kaj difinite. La ebleco de unueca teorio de kulturaj fenomenoj, kiuj estas konstruitaj helpe de semiotikaj metodoj, ankoraŭ estas en malproksima estonteco. Plie: estas eĉ malfacile antaŭvidi kiel atingi tiun celon. Kulturaj fenomenoj estas tro diversaj kaj komplikaj por esti malfermitaj por semiotikaj metodoj entute. Krom tio la plivastigita nocio de "signo", kiun oni akceptas en la semiotika aliĝmaniero, ne liveras taŭgan ilon por fari koherecon kaj science pravigitan disigon inter kulturo kaj naturo.

Adreso de la aŭtoro: prof. d-ro T. Pawlowski, Wierzbowa 38w.48, PL-90 245 Łódź.  
Esperanto-traduko: Brigitte Frank-Böhringer.

### Rosseau kaj montara civito.

Gacond, Claude: *Rosseau kaj montara civito, Literatura Foiro*, 1978, n-ro 49.

Temas pri letero skribita en julio 1765 al Sinjoro d'Alembert fare de Jean-Jacques Rosseau migranta tra Neŭŝatela Ĵuraso. Ŝajnas, ke li trovis en La Chaux-de-Fonds unikajn geografiajn kaj historiajn kondiĉojn, kiuj perfekte akordis kun lia klerisma penso.

Fakte tiuj montaranoj ŝajnas al la filozofo praktiki lian kredon; ili vivas en domoj "ĉiu el ili estanta la centro de la dependa bieno... samtempe proponas la kvieton de la retiriĝo kaj la agrablon de la societa vivo".

Feliĉe neniuj profesia laboristo eniras tiun ĉi valon ĉar ĉiu per si mem prizorgas sian utilaron, kaj restas al ili tempo por fabriki diversspecajn objektojn, precipe horloĝojn, kiujn oni disvendas al la turistoj.

Ĉio estas farita sen instruistoj, nur laŭ la tradicio kaj la natura instinkto. Natura instinkto, kiu tamen ne brutigas ilin, harmonie kun la konvinkoj de Rosseau, ĉar ili legas librojn kaj estas sufiĉe kleraj.

Se Rosseau parolis pri "svisa Siberio", certe li pensis pri klerisma paradizo.

Adreso de la aŭtoro: Literatura Foiro, BP771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisujo. Resumo originale, verkita.

praktika celo kondukas al la adekvata realigo de klerigaj kaj edukaj taskoj el-tireblaj el la materialo mem.

### 1. Praktikaj celo kaj taskoj.

La praktika celo de Esperanto-studado estas ebligi la interkontaktigon kun tiuj, kiuj uzas Esperanton en la internacia trafiko. La lernanto estu kapabla perhelpe de Esperanto akiri novajn informojn el la diversaj teritorioj de la internacia vivo kaj kapablu informi la aliajn buŝe kaj skribe pri nia vivo, pri nia lando, pri niaj rezultoj.

Tiucele la lingvaj kapabloj de la lernanto estas evoluigendaj tiomgrade, ke per la alproprigita vorttrezoro kaj gramatikaj spertoj:

- a. ili komprenu en la kadroj de lernitaj temoj la Esperanto-parolon;
- b. ili kapablu paroli pri la plej gravaj temoj de la ĉiutaga vivo;
- c. ili scipovu perhelpe de la vortaro:

1. kompreni kaj ĝuste traduki gepatrolingven tekston, enhavantan nekonsistajn vortojn, gramatike malfacilan;
2. esprimi siajn pensojn en simpla formo skribe;
3. korespondi en la internacia lingvo.

Esperanto, kiel formaligita lingva modelo ebligas en la lastaj du jaroj de la mezlernejaj studoj la sistemigon kaj ĝeneraligon de la lingvaj konoj, akiritaj en la gepatra lingvo, respektive en la rusa kaj alia fremda lingvo. Per tio la lernanto akiras ĝeneralajn lingvistikajn konojn kaj dume plivastigas lia ĝenerala lingvistika kulturo kaj konsciiĝas la ĝusta uzado de sia gepatra lingvo. Tiamaniere Esperanto liveras elaste konverteblan ĝeneralan lingvistikan konon, kiu kapabligas la lernanton akiri novajn konojn kaj kontribuas al la ĉiama renovigo de liaj franclingvaj emoj. Tiuj ĉi kapabloj kaj spertoj poste helpas la lernantojn en la supergradaj studoj, precipe en la prepariĝo al lingvopostulaj fakoj.

La tasko de la lernejo estas la instruado de bazaj, poste pluevoluigeblaj konoj: inter hodiaŭaj cirkonstancoj instruas kaj edukas konsiderante la morgaŭajn postulojn. Pro tio la lernantoj fininte la mezlernejajn studojn estu kapablaj pluevoluigi siajn Esperantlingvaj kaj ĝeneralajn lingvistikajn konojn.

### 2. Kleriga celo kaj taskoj.

Esperanto ne estas la kanalo de iu etna kulturo. Ĝi ne limigas la klerigan materialon je unu sola kulturo reprezentata far unu sola nacia lingvo. Sekve ĝia kultura materialo estas universala. Per Esperanto la lernantoj ekkonas la progresivajn tradiciojn de la tuthomara historio, la elstarajn eventojn de la internacia vivo, la vivon kaj agadon de tiuj elstaraj personecoj kiuj luktis por la libero de la pensado kaj por la progreso de la homaro. Ĝi malfermas ebl-

econ ekkoni la kulturajn kontribuojn [sciencajn, artajn kaj literaturajn] de la popoloj parolantaj tielnomatajn malgrandajn lingvojn. Ĝi ebligas pli vastan koncentrigon inter la lingvaj kaj nelingvaj studobjektoj [mondliteraturo, historio, geografio, arthistorio kaj aliaj].

### 3. Edukaj celo kaj taskoj.

La internacia lingvo Esperanto naskiĝis pro tio, ke ĝi per siaj modestaj modeloj kontribuu al la interkompreniĝo de la homoj, servu la pacan kunvivadon. La internacia Esperanto-movado [karaktere humanisma, kultura movado] ĉiam estis integra parto de la internacia laborista pacmovado. El tio sekvas, ke interne de la politika mondpercepta edukado ĝi plej efike povas kontribui al la edukado je internaciismo.

La multkoloraj kaj tre variaj aktivecoj organizataj far la internacia Esperanta studenta movado [studenta korespondado, renkontiĝoj, internaciaj tendaroj kaj junularaj kongresoj, kaj similaj] liveras eblecojn ekzerci kaj apliki la lingvon, interligi amikajn rilatojn, kaj partopreni la internacian vivon.

La universaleco de la kultur-kleriga materialo kontribuas al la internacia interkomprenemo, al la edukado al socialisma humanismo kaj al socia aktiveco.

La neŭtraleco de Esperanto ekskludas la privilegion de gepatrolingvanoj kaj kondukas al la rekonon, ke inter la lingvoj kaj kulturoj ne ekzistas kvalita hierarĥio, kaj per tio ĝi servas la patriotisman edukadon integritan en la internaciismo.

La tekstmaterialo ebligas la demonstradon de la graveco de harmonia rilato inter la individuo kaj komunumo, emfazas la valoron de la kolektiva agado.

La politikan, mondperceptan, patriotisman kaj kolektivian edukon servas la literaturaj fragmentoj, poemoj, kantoj ktp. Samtempe ili kontribuas al la estetika edukado, malfermas pardonon antaŭ la noblaj kulturvaloroj de la homaro.

La instruado de formaligita lingvo donas bonegajn eblecojn en la intelekta edukado de la lernantoj. La simpla kaj logika sistemo de Esperanto evoluigas la induktan kaj deduktan kapablon kaj la analogi-kreadan kapablon de la lernantoj. La observado de la rilato inter lingvo kaj pensado, inter lingvo kaj socio, kaj inter la diversaj lingvoj kontribuas al la elformigo de dialektika materialisma lingvo-koncepto de la lernantoj, evoluigas la logikan pensmanieron kaj abstraktigan kapablon de la lernantoj. La liberaj morfemo-kombiniĝoj en Esperanto ebligas ilian analogian aplikon, por memstare produkti similajn kombinaĵojn.

Per la analizado kaj komparado inter la gepatra, fremda kaj internacia

lingvoj konsciigas la analogiojn kaj deviojn, evoluas la diferenca kapablo de la lernanto, kaj konsciigas la specifeco, riĉeco kaj beleco de la gepatra lingvo.

Pro la facileco de Esperanto en la klaso ne estas granda diferenco inter la lernantojn, tiamaniere ankaŭ la lernantojn, vivantaj inter malfavoraj cirkonstancoj, povas havi sukcesojn.

### 4. Ĝeneralaj metodologiaj principoj.

1. La fremdlingva edukado estas tasko postulanta integran, interdisciplinan koncepton kaj kunlaboron. La alproprigo kaj uzado de la fremda lingvo estas kompleksa agado, mobilizanta intelektajn, sentajn kaj volajn sferojn kiuj postulas la aktivan kunagadon de la pedagogo kaj la klaso.

2. — La lernantan aktivecon certigas antaŭ ĉio la ĝusta motivado: la lernanto devas scii kial li lernas la lingvon, por ke li mem volu ĝin alproprigi.

3. — La facileco de la lingvo per si mem ankoraŭ ne motivas. Cele de la konstanta atento-veko kaj interesiĝo oni devas konstrui interesajn, informaricajn instrufontojn, gvidi vivplenajn studhorojn, certigi de horo al horo la sukcesojn kaj praktikan aplikadon.

4. — Al la aktiveco de la lernantaro kontribuas ankaŭ la fakto, ke en Esperanto li ne baraktas kun la inhibo de ekparolo, ekde la unua studhoru li kuragas paroli, demandi, eĉ iniciati konversacion.

5. — Tiun ĉi karakterizon de la lingvo oni ekspluatu cele de la maksimuma Esperant-lingva horgvidado. En Esperanto oni povas eviti la gepatrolingvaj klarigojn, oni povas jam frue komenci la unulingvajn semantigojn.

6. — La studhoru, gvidata Esperante, estos des pli efika kaj sukcesa, ju pli viva ĝi estos. Anstataŭ teorie oni instruu la lingvon praktike, anstataŭ konoj pri la lingvo la lernanto alproprigu lingvajn spertojn kaj kapablojn, t.e. la kapablo apliki Esperanton en la internacia informaci-interŝanĝado.

7. — Samtempe oni ne povas rezigni pri la principo de konscienco, precipe dum la lingvokomparadoj.

8. — La studfontoj estas konstruendaj tiel, ke la materialo estu facile realigebla, kaj grafike [lernolibro, laborkajero, testfolioj] kaj bilde [diafilmoj], kaj akustike [magnetofonbendo].

## De aŭ da.

André Cherpillod

Povas okazi kelkfoje, ke oni hezitas inter tiuj ĉi du prepozicioj. *De* montras, interalie, posedon, deirpunkton, aganton, konsiston, dum *de* montras nur kvanton, kaj nur en la kazo, kiam la komplemento estas nedifina. “Glaso *da* akvo”, “pli *da* lumo” temas pri certa kvanto (malpreciza) da akvo, da lumo; kaj “glaso”, “pli”, esprimas tiun kvanton. Se la komplemento estas difina, oni devas uzi *de* anstataŭ *da*: “glaso *de* tiu malpura akvo”, “sumo *de* mil frankoj”.

Sed ĉu oni devas diri “bukedo de floroj” aŭ “bukedo da floroj”? ĉu “vico de soldatoj” aŭ “vico da soldatoj”? Ambaŭ povas esti korektaj: tio dependas de la nuanco esprimita. Por forigi ĉian heziton, oni memoru tiun regulon, ŝulditan al la interlingvisto P. Stojan:

—o de X estas —o  
—o da X estas X.

Alivorte, *de* reliefigas la antaŭan vorton, *da* reliefigas la postan. “Bukedo *de* floroj” estas esence *bukedo* (la antaŭa vorto): *floroj* estas nur akcesora precizo. “Bukedo *da* floroj” estas esence *floroj* (posta vorto), kaj *bukedo* esprimas nur kvanton de tiuj floroj. Se oni volas esprimi, ke oni donis bukedon, kaj ke tiu bukedo konsistis el floroj, oni diru “bukedo de floroj”; se oni volas esprimi, ke oni donis florojn, en kvanto de unu bukedo, oni diru “bukedo da floroj”.

Ĉu diri *de aŭ da* en “unu vico ... soldatoj pafis”? Se la vico (antaŭa vorto) pafis, oni uzu *de*; se la soldatoj pafis, oni uzu *da*. Kompreneble, *da* taŭgas en ĉi tiu frazo, ĉar pafis ne la vico, sed la soldatoj.

“Sin etendis senfina vico ... ŝipoj”. Kompreneble, ŝipo ne povas sin etendi, sed ja vico (antaŭa vorto). Do “sin etendis vico de ŝipoj”.

“Oni aranĝis por la princo serion ... ĉasoj”. Oni ne aranĝis serion, tio

havas nenian signifon: oni aranĝis ĉasojn (posta vorto). Do “serion da ĉasoj”.

“Ili dronis en malluma aleo ... arboj”. Ili ne dronis en la arboj sed ja en la aleo (antaŭa vorto). Do “en malluma aleo de arboj”.

el *La Esperantista Laboristo* de la Esperantista Federacio de la Laboro.

LASTMOMENTA INFORMO.

*La simpozio de ILEI en Parizo estas prokrastita al aŭtuno 1979.*

## Szerdahelyi, Migliorini, Varankin, Sadler.

Bruĉjo Kasini

Unu el la problemoj, kiujn daŭre alfrontas la instruistoj (ne nur tiuj de Esperanto...) estas la elekto de taŭgaj instru- kaj lego-libroj por siaj kursanoj. En ĉi tiu rubriko, mi klopodos helpi la Esperanto-instruistojn ĉi-rilate, prezentante kelkajn librojn, iuj jam famaj, aliaj ankoraŭ ne sufiĉe konataj, por la diversaj niveloj de Esperanto-instruado. Kun la konsidero, ke ĉar temos ofte pri novaj libroj, la instruistoj mem multon povos profiti el ties konado.

### 1. Elementa instruilo.

István Szerdahelyi: *Esperanto 1 internacia*, 3a eld., Lernolibro-eldonejo, Budapeŝt, 1972; p. 260, B5, il., bd.. Prezo: 2700 liroj.

Refoje recenzi la lernolibron de Szerdahelyi ne havus sencon, tiom konata kaj uzata ĝi estas: tio jam pli ol ĉiu recenzo pruvas ĝian taŭgecon. Kaj ĝiaj limoj ankaŭ estas bone konataj: ĝi estas aparte intencita por instruado en elementaj lernejoj, kaj uzi ĝin kun pli aĝaj lernantoj povus kaŭzi kelkajn problemojn. Sed eble ĝis nun oni preteratentis ĝian utilon kiel materialon por la plej superaj Esperanto-kursoj, kie ĝi aparte taŭgas kiel modelon por rekta Esperanto-kurso, kiu ne peru siajn instruataĵojn tra nacia lingvo.

### 2. Eterna legolibro.

Elio Migliorini: *Esperanta legolibro*, 5a eld., Itala Instituto de Esperanto, s.l., s.j.; p. 256, B6. Prezo: 2000 liroj.

Ekde la unua eldono, kiun prizorgis ankaŭ la lingvisto Bruno Migliorini, frato de Elio, la libro daŭre pliampleksiĝis kaj —ĉefe— aktualigis, kaj en la aspekto (la kovrilo, kvankam ter simpla, estas tamen imitinda modelo por multaj Esperanto-instruiloj), kaj en la enhavo: la verkoj de Lapenna, Konisi

Gaku, William Auld, Nicolino Rossi kiujn ĝi prezentas, certe ankoraŭ ne vidis paperon kiam tiu ĉi krestomatio ekaperis; la proverboj de Zamenhof alterniĝas en la libro kun eseetoj, rakontoj, poemoj — ĉio en didaktika krescendo kaj en apoteke balancita proporcio. Certe pluraj postkursanoj povus profite ampleksigi sian lingvokonon en neenua maniero per tiu ĉi mirinda verko, ĉiam reaperanta post ĉiam-pli-rapida elĉerpiĝo de stokoj, kvazaŭ ia papera fenikso, kies nesto estas la tuta Esperanto-kulturo.

### 3. Prozo.

Vladimir Varankin, *Metropoliteno*, originala romano, TK, Kopenhago, 1977; p. 252, B5, br. kaj bd. Prezo (bd): 18000 liroj.

Temas pri dua eldono de intermilita romano, kiu tiam restis preskaŭ nekonsiderata; tamen, ĉe finleĝo de ĝi oni konscias stari antaŭ unu el la plej kompletaj romanoj en Esperanto, kiu malgraŭ la paso de la jaroj ankoraŭ ĝuas apartan freŝecon; ankaŭ la apartaĵojn lingvajn, per kiuj la aŭtoro redonas la slavan medion de Moskvo, kie disvolviĝas duono de la rakonto, ne nur ne ĝenas, sed helpas al plena orientiĝo en la daŭra transsalto de tiu medio al la germana de Berlino, saltado per kiu la aŭtoro montras la paralelismojn kaj la diferencojn inter la du mondoj, orienta kaj okcidenta (pli ol socialisma kaj kapitalisma), kaj la malsamajn reagojn de la protagonisto en la du ĉirkaŭaĵoj.

La eldonisto, T. Kehlet, tiom aprecis tiun ĉi romanon, ke li nun prizorgas eldonon de la angla traduko; ofte, en prezento de Esperanto-verkoj, eldonisto asertas, ke ĝi "plene taŭgas ankaŭ por nacia publiko": Kehlet ĉi-foje volas pruvi tion per faktoj, kaj mi ne dubas, ke ĉi tiu libro estas la plej taŭga por tion provi.

### 4. Poezia revolucio.

Victor Sadler, *Memkritiko*, poemaro, Koko, [Kopenhago], 1967; pp. 60, B6, bd. Liroj 3000.

Kiam aperis tiu-ĉi libro, antaŭ dekdu jaroj, la avangardo de la Esperanto-poezio estis ankoraŭ alroĉita al la principoj prezentitaj en la *Parnasa gvidlibro*; eĉ *Stupoj sen nomo* de Ragnarsson, kiu en 1959 tiom skandalis Kalo-csay-n, enportis en nian literaturon nur parton de la renovigoj tiam skuantaj la nacilingvajn kulturojn. Estis fakte Sadler la iniciatinto de la moderna Esperanto-poezio, kaj jukas la rimarko ke tiom malmulte da personoj tion rimarkis, se juĝi de la vendstatistikoj de UEA.

Karakterizoj de la Sadlera poezio estas la daŭra klopodo forigi rimojn kaj regulajn versojn, tiujn balastojn kiuj bremsis la liberiĝon de nia literaturo almenaŭ duonjarcenton pli ol ili katenis la nacilingvajn; estas la tendenco plene

eluzi la signifojn (konsciajn kaj nekonsciajn) de la Esperanto-vortoj, tendenco kiun poste daŭrigos Ragnarsson; estas la ampleksa kono de orientaj filozofioj kaj kulturoj, kio definitive lokigas lian poezion je nepre internacia nivelo.

Ne estas do facile kompreni, kial tiu-ĉi libro restis tiom malatantita ĝis hodiaŭ: eblan klarigon donas Sadler mem, en sia poemo "Pledo" (p. 51 de la libro):

*soleco, nokto, forgeso, spaco, silento  
estas mankoj, kiuj sen mankanto  
ne havus nomon.*

Jen: iel simile, eblas ne bezoni ĉi tiun poemaron, nur ĝis kiam oni ne konas ĝin. Ekde tiam, ĉio antaŭa aspektas arĥaika.

*Ĉiuj verkoj prezentitaj en ĉi-tiu rubriko estas mendeblaj  
ĉe la libro-servo de ILEI, prizorgita de la firmao:  
EDISTUDIO, internacia eldonejo  
casella postale 213 — i-56100 Pisa, Italujo*

La vendkondiĉoj estas la kutimaj en la Esperanto-merkato: al ĉiu fakturo aldoniĝas 10% por kovro de administraj kaj sendaj kostoj; mendoj de almenaŭ tri ekzempleroj de la sama titolo ricevas rabaton de 1/6 (16,7%); la rabato estas duobla (1/3, t.e. 33,3%) se temas pri eldonaĵoj ekskluzive distribuataj (indikataj per \* ĉe la bibliografia slipo sub la titolo de la recenzo).

## D. ESTRARAJ INFORMOJ DE ILEI.

# 13a Internacia Konferenco en Lokarno, Svisujo.

I.L.E.I.

Kiel jam anoncite per prot. 5/1978 de la 20.09.1978, danke al samideanoj Dante Bertolini kaj Kurt Greutert, la 13a Internacia Konferenco de ILEI okazos de la 19a ĝis la 27a de julio 1979a ĉe *Porinstruista lernejo "Scuola Magistrale Cantonale — placo san Francesco 19 — Lokarno, Svislando — tf. 0041-93/315115*, kun temo "Infano kaj lingvo".

Programo.

07.19, ĵaŭdon.

19a h.: ĉiuj konferencanoj estu en la konferenca loĝejo "Casa dello studente", strato Saleggi 16, tf. 093/317212.

07.20, vendredon.

10a h.: solena inaŭguro de la konferenco (→ palaco Sopracenerina, Granda placo). Tagordo:

1. festparolado pri la temo "La jaro de la infano: epizodo aŭ averto";
2. enkonduko en la laboron kaj konferencan programon;
3. studrondo por Esperanto-instruistoj: (a) lingvistiko de Esperanto, (b) metodiko de Esperanto, (c) historio de Esperanto, (ĉ) literaturo de Esperanto, (d) prova ekzameno laŭ la regularo de ILEI.

07.21, sabaton.

9a h.: laboroj de la konferenco.

16a h.: prelego kaj diskutoj.

07.22, dimanĉon.

10a h.: solena ekumena kuncelebrado de la sankta Meso en preĝejo sankta Francisko (oni antaŭvidas partoprenon de la vicepiskopo Wladisław

Miziolek el Varsovio kaj de la protestanta pastro s-ro Burkhart).

16a h.: prelego pri "ILEI 30-jaraĝa" kaj diskutoj.

20,30: la instruistoj sin prezentas.

07.23, lundon.

9a h.: laboroj de la konferenco.

10a h.: vizito de urbaj, lernejoj kaj kantonaj instancoj.

16a h.: prelego kaj diskutoj.

07.24, mardon.

Tuttage: ekskurso al "Isola Bella" (Bela Insulo).

07.25, merkredon.

9a h.: ronda tablo pri "Multaj lingvoj – neniuj lingvoj: sociaj problemoj pro lingva diverseco". Partoprenos instruinstancoj, sindikatistoj, reprezentantoj de kulturaj organizaĵoj ktp.

16a h.: prelego kaj diskutoj.

07.26, ĵaŭdon.

9a h.: Asembleo de ILEI. Tagordo: (a) raporto de la prezidanto pri la trijara periodo, (b) raporto de la vicprezidanto pri la lerneja evoluado de Esperanto en la socialismaj landoj, (c) raporto de la ĝenerala sekretario pri siaj spertoj koncerne la ILEI-sekciojn, (ĉ) raporto pri Internacia Pedagogia Revuo, (d) raporto de la kasisto pri la financa bazo de ILEI kaj farendaĵoj por plibonigi ĝin, (e) raporto de la kontrolo komisiono, (f) diskutado kaj senŝarĝigo de la estraro, (g) fiksado de novaj membro-kotizoj.

16a h.: daŭrigo de la Asembleo. Tagordo: (ĝ) sveda-dana estrarproponoj pri ŝanĝoj en la statuto de ILEI, (h) elektado de nova estraro [1980-1982], (ĥ) proponoj, diversaj.

07.27, vendredon.

9a h.: laboroj de la konferenco.

11a h.: konkludoj, rezolucioj, fikso de la venontjara konferencloko. Fermo de la konferenco.

Ptm-e: je dispono de la konferencanaro por viziti la urbon kaj butikumi.

20,30: adiaŭa vespero.

07.28, sabaton:

7,50\*: forveturo de la konferencanoj el Lokarno, trajne, per speciala vagono se temas pri sufiĉe granda grupo, al Lucerno por partopreni la UKn.

11a h.\*: alveno al Lucerno. \* la horoj indikitaj estas provizoraj.

Asembleo de ILEI – Elektro de la landaj delegitoj.

Dum la 13a Internacia Konferenco de ILEI, okazonta de la 19a ĝis la 27a de julio 1979a en Lokarno (Svislando), kunvenos la Asembleo de la Ligo. Laŭ la § 8 de la Statuto, ĉiu landa sekcio de la Ligo devos elekti delegitojn, unu delegito po 30 membroj (31-60 membroj: 2 delegitoj, ktp.).

Komprenoble rajtos voĉdoni nur tiuj delegitoj kies landa sekcio pagis la membrotizojn por la finiĝinta kalendara jaro; delegitoj de landaj sekcioj kiuj ne pagis la kotizojn dum la du sinsekvaj jaroj, ne rajtas voĉdoni.

Mi invitas ĉiun landan sekcion de ILEI, komuniki al mi kiel eble plej baldaŭ kaj maksimume ĝis la fino de aprilo 1979a siajn delegitojn, indikante nomon, antaŭnomon kaj kompletan adreson, por ke oni havigu al ili la rajtigilon por la voĉdonoj.

La Asembleo voĉdonos la 26an de julio 1979a, je la 9a horo en Lokarno. La delegitoj ricevos la tagordon de la asemblea kunveno.

## Internaciaj Someraj Esperanto-Kursoj

sub aŭspicioj de ILEI kaj de TEJO

Bruĉjo Kasini

**kio** Internaciaj Someraj Esperanto-Kursoj por knaboj kaj knabinoj

**kiam** 16 - 25 de junio 1979a

**kie** *Piani di Luzza* (Pjani Diluca), komunumo de Forni Avoltri, provinco de Udino (*Udine*), regiono Furlanujo (Italujo)

**kiu** knaboj kaj knabinoj inter 8 kaj 20 jaroj de aĝo (prefere 8-15)

**kiom** entute 90 knaboj, plus instruistoj kaj gvidantoj

**kia** en moderna, belega feria domo de *Opera Diocesana Assistenza* (eklezia bonfara organizo), disponanta pri ĉiuj bezonaj servoj, granda manĝejo, laborsalonoj, futbalejo, infanluda ĝardeno, korbopilkludejo ks, meze de altira alpa valo

**kial** ĉar ĝis nun la Esperanto-organizaĵoj ne sufiĉe prizorgis la postkursan vartadon de la knaboj kiuj en diversaj landoj lernas Esperanton en sia lernejo, elementa aŭ mezgrada



**kiel** - per matena instruado de Esperanto (laŭ diversaj niveloj, sekve de la jamaj konoj de la knabo) en malgrandaj grupoj  
- per posttagmezaj distraj aranĝoj (sportado, promenoj al ĉirkaŭaj vidindaĵoj, ludoj, folkloraj prezentoj ks)  
- per vesperaj didaktikaj distraĵoj (skeĉado, lernaj ludoj ktp)

**kies** la kursojn organizas Edistudio, c.p. 213, i-56100 Pisa, Italujo, pĉk. 22-8128

la partopreno estas principe rezervita al lernantaj grupoj kun instruisto; unuopuloj estas allaseblaj nur escepte

ĉiu partoprenanta knabo devas pagi, por la tuta aranĝo, 85 000 lirojn, kio inkluzivas ĉion ekde la vespermanĝo de 06.16 ĝis la matenmanĝo de 06.25; de tiu sumo, 20 000 lirojn estu antaŭpagataj al la supre citita poŝtĉekkonto, la resto ĉe la alveno ĉe la feriejo.

### Teknika projekto.

La Internaciaj Kursoj celas ĉefe renkontigi la lernantojn de la elementaj kaj mezgradaj eŭropaj lernejoj enkondukintaj – eksperimente aŭ definitive – la instruadon de la internacia lingvo Esperanto en siajn programojn, kaj permesi komparon de la rezultoj laŭ la diversaj uzitaj metodologioj.

La Kursoj antaŭvidas du aspektojn:

*didaktika aspekto:* kiu per intensaj instru-unuoj permesos forigi eventualajn malsamojn en la scinivelo de la diversaj partoprenantoj, kaj doni formalan bazon al la lingvaj spertoj kiujn la lernantoj akiras dum la internaciaj kursoj mem, en la kontakto kun la alilandaj lernantoj;

*kunviva aspekto:* kiu per diversaj distraj aktivecoj permesos al la lernantoj plibonigi la reciprokan interkonon kaj akiri valorajn lingvajn spertojn, pro la nepra uzo de la internacia lingvo, danke al la internacia etoso.

### La didaktika aspekto.

Ĝi konsistas el lecionoj de Esperanto, devigaj por ĉiuj aliĝintaj lernantoj, kiuj okazos dum la matenoj. La lernantoj estos dividitaj en grupoj de 15-20 homoj, laŭeble homogenaj rilate la lingvokonon, sed ĉefe kiel eble plej internaciaj.

Ĉiun grupon kunordigos du instruistoj, elektitaj inter la lernejoj fakuloj kiuj akompanos la diversajn grupojn de lernantoj, kaj inter kelkaj specife alvokitaj pedagogoj.

La uzo de instruistoj, profesie instruantaj Esperanton al knaboj de la sama aĝo, garantias specifan pedagogian sperton kaj kutimon al laborado kun tiaj lernantoj. La organizantoj kovros eventualajn kromajn bezonojn per instruistoj kun aparte difinitaj spertoj kaj kapabloj.

Apartan prizorgon ricevos la kunordigo de la instruantoj ĉe la diversaj grupoj, per ĉiutagaj didaktikaj-pedagogiaj kunvenoj, por kompari kaj plani la instru- kaj lerno-nivelojn.

### La kunviva aspekto.

La loĝejo kie okazos la Kursoj – la Feria Hejmo en la vilaĝo *Piani Di Luzza* (Pjani Diluca), komunumo de Forni Avoltri, provinco Udino (*Udine*), permesas vastan eblon da distraj kaj ripozigaj aranĝoj kaj daŭran rektan kontakton inter la junaj partoprenantoj.

La geografia lokiĝo de Pjani Diluca instigas al pluraj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo, pejzaĝe kaj turisme ege interesa. La loĝejo mem estas inter alie provizita per pluraj sportaj ludejoj, kiuj ebligas organizi komunajn aktivecojn por la lernantoj, kiuj povos tiel plene profiti la posttagmezajn horojn; parton de tiuj horoj oni lasos liberaj, por la persona iniciato de la lernantoj mem, tamen ĉiam sub la kontrolo de la instruistoj.

La sidejo ankaŭ disponas je lernoĉambroj, uzablaj – krom matene kiel instruejoj – ankaŭ posttagmeze kaj vespere por kromaj aktivecoj kiel dramigado, liberaj sinesprimaj prezentoj, kaj por gastigi en la Kursoj prezentantojn de folkloraj grupoj, de kabaredistoj kaj kantistoj, por centrigi la atenton de la lernantoj ĉe specifaj kulturaj eblecoj kaj por stimuli ties personan kreivon.

Dum la tuta kunviva aspekto oni aparte flegos la lingvan problemaron; tiel ankaŭ tiuj ĉi kromaj horoj iusence distraj kontribuos al kreo ĉe la internacia lernanto de sento pri aparteno al nedisigebla, internacia komunumo.

## Tendaro en Pollando.

Josef Chvosta

En julio kaj aŭgusto estas organizataj tri etapoj de la Somera Esperanto-tendaro en Lančov. Ĉiu etapo estas dusemajna, la komenco de la etapo estas dimanĉo. La tendaranoj loĝas en tendoj aŭ kabanjoj. Antaŭtagmeze estas lernado de Esperanto en kursoj por komencantoj, por progresintoj, por konversacio, por instruantoj, eventuale aliaj specialaj kursoj. Estas kvar lecionoj kaj leciono de kantado. Posttagmeze estas sportoj, ludoj, ekskursoj, banado, sunumado, konkursoj kaj aliaj amuzoj. La kursoj estas finataj per ekzamenoj, la kursanoj ricevas diplomojn. La tendaro estas relative malmultekosta, ĉar la tendaranoj plenumas mem kelkajn devojn kaj obeas la disciplinon partoprenante en la lernado. La tendaro estas jam tradicia: ĝi estas jam la 27a.

Ne hezitu kaj aliĝu, ĉar la nombro por ĉiu etapo estas limigita. Vi povas

## Mortis Gaston Turin.

*funebra parolado de Giorgio Silfer ĉe la enterigo*

Al la mistero de morto ĉiu kulturo klopodas doni respondon. Ĝi neniam estas respondo definitiva, eĉ ne gravas ĝia signifo, sed la bildo kiun ĝi elvokas. Kvazaŭ ne vortoj en sia komprenebleco, sed tono de frazo, tembro de voĉo, eĥo de loko donus la trafan respondon. Oni ne demandu: *kiun* respondon ofertas via kulturo, sed *kian*. Ĉar la respondo ne estos floro, sed la parfumo de floro; ne estos vino, sed la efiko de vino; ne estos glacio, sed la malvarmo de glacio.

Kia estas la respondo de nia kulturo, de la Esperanta kulturo? Ĉu ekzemple Morto havu nuancon viran, do posedeman kaj detruan, kiel *Thanatos* ĉe la pragrekoj; aŭ ĝi havu nuancon virinan, do akceptan kaj akuŝan, kiel *Mors* ĉe la romianoj, ne pli danĝera ol Dormo, kies fratino ŝi estas?

En nia lingvo Morto ne havas sekson: ĝi estas kiel la finna *Kuolema*, li kaj ŝi kune. *Kuolema* kondukas al sia regno, al *Tuonela*, sur kies nigra rivero cigno glitas, kantante. Bildo de antikva mitologio norda, kiu donas unuavice la senton de la malproksimiĝo.

Ni kunvenis hodiaŭ por senti ĉi tiun malproksimiĝon. Kolego Turin forpasis abrupte, kaj tiu ĉi malproksimiĝo impresas pli profunde, ĉar ne anoncita, ĝuste kiel nokta ŝtelisto, se citi el alia kulturo, kiu entenas nian tutan Eŭropon, alian respondon. nome kroman nuancon. Kolego Turin estis fidela amiko de ĉiuj Esperantaj institucioj en La Chaux-de-Fonds: apoganto de Kultura Centro Esperantista, alpruntanto de Gastejo "Edmond Privat", abonanto de "Literatura Foiro", aktiva ĉeestanto de niaj plej gravaj kulturaj aranĝoj. Lia partopreno nun estas for.

Sed al tiu malproksimiĝo nia Esperanta kulturo ne respondas per *kdinigo* en si mem. Se ni pensas pri homo kiel Rabindranath Tagore, kiu estis amiko de granda svisa pedagogo kaj esperantisto, Pierre Bovet, kaj mem esperantisto, ni kaptas instruon kiun mi ŝatas rememori hodiaŭ.

La penso kaj la agado de Tagore kunfandas du elementojn: unu estas la hinda universaleca aspiro, celanta al io transcenda, la alia estas la serena aktivismo heredita el okcidento. Tiu aspiro kaj tiu aktivismo estas propraj de popolo kiu esperas, kaj ĝuste pro ili la malproksimiĝo de unu el niaj vicoj akiras la signifon de stimulo al persisto. (1979.03.08an)

### Sekciestroj de la Ligo

Aŭstralujo:	prof. Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840.
Aŭstrujo:	Ernst Rixner, Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno.
Belujo:	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal.
Brazilo:	Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
Britujo:	Hilary Chapman, 7 fairacre road, Barwell, Leicester LE9 8HH.
Bulgarujo:	Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia.
Danujo:	Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre.
Finnujo:	Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Francujo:	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
F.R.Germanujo:	d-ro Hermann Behrmann, Grunigerstr. 5, D-4790 Paderborn.
Grekujo:	Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno (816).
Hispanujo:	prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Hungarujo:	Zsuzsa Bacsay, PF 139, H-1368 Budapeŝto.
Israelo:	Baldur Ragnarsson, sogavegur 170, Reykjavík.
Italujo:	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv.
Japanujo:	d-ro Catina G. Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa - pĉk. 22/2883.
Jugoslavujo:	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Luksemburgo:	d-ro Miodgrad Stojanoviĉ, Duruntorska ul.2/iv-32, YU-11000 Beograd.
Kanado:	Robert Hoegener, 4 rue des charbons, Esch/Alzette.
Kolombujo:	vidu Nordameriko.
Koreujo:	prof. Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin.
Malagasujo:	-
Nederlando:	prof. Eugene Raveloson, BP 127, Tananarive.
Nordameriko:	Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl.
Norvegujo:	John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266.
Nov-Zelando:	Margrete Landmark, Universitet i Oslo, Psykologisk Institutt, Postboks 1094, Blindern, Oslo 3.
Polujo:	Gwenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt.
Rumanujo:	-
Sanmarino:	prof. Marina Michelotti, via xxv marzo 73, I-43031 Rep. San Marino.
Sovet-unio:	Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV.
Svedujo:	Nikolaj Starodubĉev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck.
Svisujo:	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund.
Usono:	Olivier Tzaut, CH-2610 Mont-Soleil.
	vidu Nordameriko.

### Izolitaĵoj

Ĉeĥoslovakujo:	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Píbram.
Germana D.R.:	d-ro Till Dahlenburg, Str. d. DSF 13, DDR-2722 Brüel.
Irano:	M. Saghafian, ŝiras ave., Emdadi st. 22, Vanak, Teheran 19.
Jemena P.D.R.	d-ro Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh hospital, Khormaksar, Aden.
Kubo:	Pedro Pablo Lamas Díaz, apartado 223, Ciego de Avila.
Singapuro:	Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14.
Zairujo:	Antoine-Samuel Nangu, BP 13, Lukala, Nkandu.

### **Estraro de ILEI**

prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, In der Horstwiesen 42, D-315 Peine,  
Fed. Resp. Germanujo.  
vicprezidanto: direktoro Johano Ingusz, Liget út.40, H-1102 Budapest X, Hungarujo.  
sekretario: d-ro Mario Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, Italujo.  
vicsekretario: Gaston Turin †  
kasisto: Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo.

### **Kunlaborantaj organizoj**

FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne.  
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda.  
UEA Universala Esperanto-Asocio.  
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj.

## **INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO – IPR**

organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI  
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

Aperas trifoje jare

Redaktas: Helmut Sonnabend, In der Horstwiesen 42, D-315 Peine, FRG  
Poŝtĝirkonto: Stockholm 682 117-7, Olle Olsson, Bantorget 3, S-222 29  
Lund, Svedujo – Jarabono: 20 svedaj kronoj

la abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI  
nemembroj de ILEI pagu al la supre indikita poŝtĝirkonto.